

LA ANĜEVA FOLIO

LA FEUILLE ANGEVINE

Deux Japonais vous parleront des changements dans la vie quotidienne des habitants depuis mars 2011

**mercredi
19 septembre**

conférence

"FUKUSHIMA ET MAINTENANT..."

20h - Maison de quartier
des Hauts-de-Saint-Aubin - ANGERS

Nia monata legado

Kiel prognozi veteron

Indiĝenoj iras al sia estro kaj demandas lin:

— Alt-estimata estro, ni bezonas scii, kiom malvarma estos la venonta vintro, por ke ni komencu kolekti brul-lignon.

La Indiĝen-estro pri-pensas la aferon dum iom da tempo kaj fine diras:

— Lasu min sola, por ke mi povu demandi la Grandan Spiriton.

Post kiam la Indiĝenoj eliras el la

domo de sia estro, li telefonas al la veter-servo:

— Bon-volu informi, kiom malvarma estos la venonta vintro...
La oficisto respondas:

— Nu... ĉio montras, ke la venonta vintro estos iom pli malvarma ol ordinare.

— Ĉu vere? diras la estro.

— Dankon! Kaj li tuj ekkrias al la ceteraj indiĝenoj:

— Komencu kolekti brul-lignon tuj, ĉar ni spertos tre malvarman vintron!

Kaj la tuta indiĝenaro kolektadas lignon dum pluraj semajnoj. Fine, jam lacaj, ili iras al sia estro kaj demandas lin:

— Alt-estimata kaj saĝa estro, ĉu la ligno kolektita sufiĉos?

La estro pri-pensas sian respondon kaj denove diras:

— Lasu min sola, por ke mi povu demandi la Grandan Spiriton.

— Li denove telefonas al la veter-servo:

— Bon-volu informi, ĉu la venonta vintro estos tre malvarma...

— Jes, ni refaris niajn kalkulojn, fakte ĝi estos multe pli malvarma ol ordinare.

La estro tre maltrankviliĝas kaj kolere ekkrias al siaj sub-uloj:

— Tiom da ligno tute ne sufiĉos! Vi bezonas kolekti almenaŭ la trioblon!

Kaj la indiĝenoj kolektas, kolektas, kolektas... Post unu monato da sen-ĉesa kolektado, lacegaj, ili reiras al sia estro kaj, preskaŭ plorante, plendas:

— Alt-estimata, saĝega kaj amata estro, ni estas tiel lacaj, ke ni ne sukcesas kolekti eĉ unu plian lignopecon! Kompatu nin! Ĉu nun la kvanto sufiĉos?

La estro elirigas ilin kaj unu plian fojon telefonas al la veter-oficistoj:

— Bon-volu informi, ĉu la prognozo pri la vintro plu veras...

— Bedaŭrinde jes... ĉio klarege montras, ke la venonta vintro estos sen-dube la plej forta en la lastaj cent jaroj!

La estro timegante ekkrias:

— La Granda Spirito gardu nin de tia malfeliĉo! Sed... kiel vi scias tion? Kiel vi povas esti tiom certa?

Kaj la oficisto trankvile respondas:

— Facile... Indiĝenoj jam de pluraj monatoj kolektadas brul-lignon kiel frenezuloj!

Francisco Wechsler – Brazilo
Fonto: www.facila.org

Le Collectif du 21 septembre du M&A
vous propose à Angers en 2012: conférences, débats, concert

Mercredi 12 septembre
Maires pour la Paix
205 maires du Maine et Loire, anciens ou nouveaux, de diverses opinions, soutiennent l'Appel du Maire d'Hiroshima pour la suppression des armes nucléaires d'ici 2020.
Témoignage de Mme HAMA, survivante d'Hiroshima
20h Salle Claude Chabrol (Angers, Belle Beille, route de Premier)
Film et images d'Hiroshima accompagnées de la musique « Survivre à Hiroshima » de René Maillard suivi d'un débat

Mercredi 19 septembre
Fukushima, et maintenant...
Deux Japonais nous parleront des changements de la vie quotidienne des habitants depuis mars 2011 à Angers - Maison de quartier des Hauts-de-Saint-Aubin

Vendredi 21 septembre
Journée Internationale de la Paix
En matinée: séances de cinéma et activités symboliques dans plusieurs villes du département ce jour et, aussi, les Mercredi 19 et Jeudi 20 Septembre. En soirée: débat philo pour enfants puis lâcher de pigeons. 17h30 Célébration devant le monument de la Paix, place de la Paix à Angers. 19h30 Pot de l'Amitié puis pliqueurique convivial apporté par chacun. 20h30 Greniers St-Jean, soirée « Algérie 50 ans d'indépendance » et concert du groupe de musique algérienne Agriss.

Mardi 2 octobre
La Paix en Marche
La marche Le Croisic-Paris contre la misère arrive à Claude Chabrol. Rencontres à 17h et duplex avec Rajagopal (marche des 100 000 sans terre, Inde) à 18h.

Le groupe angevin d'espéranto participe à la journée internationale de la paix

Mercredi 19 septembre

20h00 - Conférence à la Maison de quartier des Hauts-de-Saint-Aubin, Angers, sur le thème "Fukushima, et maintenant..."

Yasuo HORI et Toshinobu ARAI, espérantistes japonais, expliqueront ce que le tsunami et la catastrophe nucléaire de Fukushima ont changé dans la vie quotidienne des Japonais. Depuis le 11 mars 2011, Yasuo qui vit à 100 km à l'ouest de Fukushima a envoyé 120 messages de textes, de poèmes, de photos, d'extraits de journaux. Au travers d'exemples précis comme les fêtes populaires, la riziculture, les récréations à l'école, l'accès aux parcs publics, l'usage et la production de l'électricité, l'emploi de compteurs de radio-activité... il montrera comment la vie des Japonais est totalement et durablement bouleversée.

Vendredi 21 septembre

JOURNÉE INTERNATIONALE DE LA PAIX

17h30 - Célébration devant le monument de la Paix, place de la Paix à Angers.

20h30 - Greniers St-Jean, soirée « Algérie 50 ans d'indépendance » et concert du groupe de musique algérienne Agriss.

Mardi 2 octobre

LA PAIX EN MARCHÉ - La marche Le Croisic-Paris contre la misère arrive salle Claude Chabrol. Rencontres à 17h et duplex avec Rajagopal (marche des 100 000 sans terre, Inde) à 18h.



La 60-jariĝa festo ĉe Greziljono

Sabaton la 30-an de Junio 2012 okazis en Greziljono la 60a datreveno de nia kulturdomo. Estis gajaj retrovaĵoj kun la pasinteco por kelkaj el ni. La volontuloj kiuj laboris dum ĉiuj periodoj por Greziljono estis honoritaj. Krom la tradicia bankedo, oni povis rigardi filmon kiu rakontas la vivon de la Esperantistoj en la kastelo, ek de ĝia akiro ĝis nun. Bela aer-ellasajo

de helium-balonetoj ĉe la perono de la kastelo stampis la eventon.



Le 60e anniversaire de Grésillon

En ce samedi 30 juin 2012 a eu lieu en son château de Grésillon le 60e anniversaire de notre Maison Culturelle de l'Espéranto. Ce fut pour certains d'entre nous de joyeuses retrouvailles avec le passé. Les bénévoles qui ont œuvré pour Grésillon en toutes périodes ont été mis à l'honneur. Outre le traditionnel banquet, on pouvait voir un film retraçant la vie des espérantistes au château, de son acquisition à nos jours. Un joli lâcher de ballons prit son élan sur l'avant du château tout près du perron.



FELIĈAN NASKIĜTAGON deziras la aŭtomarko MINI !

La aŭtomarko "Mini" deziras "Feliĉan naskiĝtagon!" al Esperanto okaze de la 125-a datreveno de ties apero. La prestiĝa aŭtoentrepreno BMW eldonis

gazetaran komunikon pri tio en la ger-mana kaj ankaŭ en Esperanto. Ekzistas interesa foto ankaŭ en la plurlingva gazetara komuniko de la fabriko BMW !... Pro tio MINI deziras Esperante "Feliĉan naskiĝtagon!" kaj ĉion bonan por la venontaj 125 jaroj! ...

Fonte: <http://www.eventoj.hu>



La marque automobile Mini souhaite un heureux anniversaire à l'espéranto !

À l'occasion du 125ème anniversaire de la naissance de l'espéranto, la prestigieuse firme automobile BMW a fait paraître un communiqué dans la presse en allemand mais aussi en espéranto. Ci-contre la photo de la "Mini" ornée du drapeau espérantiste.

Source : <http://www.eventoj.hu>

AŬTUNE, komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj... ĉe Greziljono

de sabato, 27-a de oktobro
ĝis sabato, 3-a de novembro 2012

Kursoj, koncertoj, muzikado, mantraj, promenado, ludoj, kaj aliaj aktivaĵoj laŭ via elekto

Specialaj gastoj : Svetlana Smetanina el Moskvo kaj Kees Ruig el Nederlando.

en la fama kastelo Greziljono, Kulturdomo de Esperanto.

Detalaj informoj en reto : www.gresillon.org/autune
Kontakto: kastelo@gresillon.org, tel. 02.41.89.10.34
Adreso: Maison Culturelle de l'Espéranto, Grésillon
49150 St. Martin d'Arcé



Cet automne, vacances communes pour enfants, familles, grands-parents... à la Maison Culturelle de l'Espéranto de Grésillon du 27 octobre au 3 novembre 2012

Cours, concerts, musique, mantra, promenades, jeux, et bien d'autres activités à choisir.

Invités spéciaux : Svetlana Smetanina de Moscou et Kees Ruig des Pays-Bas.
Information détaillée sur internet :

www.gresillon.org/autune

Contact : kastelo@gresillon.org, tel. 02.41.89.10.34
Adresse: Maison Culturelle de l'Espéranto, Grésillon
49150 St. Martin d'Arcé

Ĉu vi deziras kontribui al la Anĝeva Folio ?

Ĉu vi deziras komuniki kun aliaj Esperantistoj, kundividi viajn spertojn ?
Verku Esperantajn aŭ francajn tekstojn (aŭ ambaŭ) pri viaj hobiaĵoj, vojaĝoj, vidpunktoj...
Proponu rakontetojn, ŝercojn, receptojn, eĉ bildstriojn aŭ desegnaĵojn.
Ĉiuj ideoj estas varme bonvenaj por riĉigi nian broŝuron kaj plibonigi ties enhavon.

Sendu viajn proponojn al : Jean-Yves Grille, 6 rue de Beaumont, 49140 Villevêque - aŭ retmesaĝe : jj.grille@orange.fr

Le 9e Congrès de l'Union Européenne d'Espéranto s'est déroulé du 16 au 20 juillet à Galway en Irlande

Eŭropa Esperanto-Unio kongresis Irlande

En irlanda urbo Galway/Gaillimh okazis inter la 16-a kaj 20-a de julio la 9-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio sub la aŭspicio de la irlanda ŝtatprezidanto Michael D. Higgins. Estis malgranda kongreso kun nur 157 partoprenantoj, sed el respektinda nombro da landoj (28), ĉefe eŭropaj, sed ankaŭ venis partoprenantoj el Kubo, Brazilo, Japanio kaj Usono.

Laŭenhave temis pri tre riĉa kongreso, kies ĉefa parto estis 11 prelegoj rilataj al la kongresa ĉeftemo "Lingvolernado en EU – Lerni pli, kosti malpli". La prelegtemoj rilate al la lingva situacio kaj lingvolernado en Irlando kaj al la propedeŭtika rolo de Esperanto en lingvolernado.

Inter la prelegantoj estis tri neesperantistoj : fakuloj pri la irlanda lingvo situacio. Kaj ĝuste pro tiu ĉi temaro ankaŭ la finkonkludoj de la kongreso estis turnitaj al la irlanda registaro.

La kongreso interalie decidis rekomendi, ke Irlando dum sia prezidado de EU en 2013 aldonu multlingvismon al siaj prioritatoj. La kongreso ankaŭ proponis, ke la EU-Konferenco pri multlingvismo, okazonta en Kipro en septembro, diskutu kiel praktike progresigi la rekomendon de la Civilsocio Platformo en la sekcio pri edukado, nome esplori, kiu unua fremda lingvo en la lernejo pleje kuraĝigas la lernadon de pliaj fremdaj lingvoj.

Krome la programo abundis per aliaj programeroj: literaturaj prelegoj, pri historio de Irlando, irlanda eksprese, pri TEJO, pri Tibor Sekelj pri la romaa lingvo, pri progreso de Esperanto en Pollando, kaj tiel plu.

Okazis kunsidoj de la asembleo de EEU kaj ronda tablo pri la popoliniciato pri eŭropa himno kaj pri la agado en multlingva Platformo de Eŭropa Komisiono. La estraro de EEU decidis ke la sekva 10-a kongreso okazos en julio 2014 en slovaka urbo Nitra.

Siajn kunvenojn havis fakaj asocioj : juristoj kaj ĵurnalistoj. Ankaŭ la kultura programo abundis : nacia vespero kun kantoj kaj dancoj irlandaj, du teatraj vesperoj („Kabarenbo pri Universalaj kongresoj“

plenumita de Saša Pilipović kaj Georgo Handzlik kaj „Ludoviko Lazaro“ plenumita de Georgo Handzlik). Handzlik partoprenis ankaŭ en kanzonkoncerto kune kun JOMO.

Okazis 3-taga antaŭkongreso en Dublino kaj 2-taga postkongreso en insuloj Aran kaj dumkongresaj ekskursoj al Galivo kaj al sudgaliva provinco kun famaj klifoj.

La kondiĉoj en la luksa hotelo Ardilaun kiel en la ĉefkongresejo estis tre bonaj. Eblis vidi plurajn prezentojn de la aktivaĵoj de E@I kaj konsulti kaj aĉeti en libroservo.



La ĉefan dankon necesas transdoni al la prezidanto de EEU, Sean O Riain kaj al Maja Tišljar, kiuj portis la ŝarĝon de la organizo preskaŭ de la tuta kongreso kaj faris tion eminente. Kunlaboris ankaŭ escepte multaj irlandaj esperantistoj, ĉefe kiel helpantoj kaj tradukantoj.

Mi mem multe lernis. Fine mi komprenis la kaŭzojn de la granda tragedio de la irlanda popolo: la perdon de la propra lingvo kaj komprenis ke lerni el tio ege gravas ĉar survoje al la sama rezulto estas nuntempe multaj malpli grandaj lingvoj en Eŭrop kaj pli vaste pro la identeca kaŭzo. Sed pri tio ni parolos en venonta artikolo. Zlatko Tišljar

Fonto : www.liberafolio.org

Esperantaj kongresoj ĉiam estas okazo por malkovri landon aŭ regionon, ĝian kulturon, pejzaĝojn, loĝantojn. Ekskursoj kaj vizitoj estis organizitaj de la Esperanta Eŭropa Unio ĉe Galivo, en la Burren-regiono, kaj en la Aran-insuloj.

Un congrès d'espéranto est toujours l'occasion de découvrir un pays ou une région, sa culture, ses paysages, ses habitants. Des excursions et visites étaient organisées par l'Union Européenne d'Espéranto à Galway, dans la région des Burren et dans les îles d'Aran.



Enir-pordo de la regiono Connemara, Galivo ĝuas la tutan jaron en festa etoso pro la riĉeco kaj la diverseco de siaj distraĵoj. La muziko kaj la vojo-animadoj estas trajtoj de la pejzaĝo. Oni proponas al la pasantoj kanzonojn, muzikon aŭ dancojn, surtrotuare, aŭ en la trinkejoj kaj restoracioj.

Porte d'entrée du Connemara, Galway baigne toute l'année dans une atmosphère festive due à la richesse et la diversité de ses attractions. La musique et les animations de rues font partie du paysage. En groupe ou en solo, on propose aux passants des chants, musique ou danses, sur le trottoir, dans les pubs et restaurants.

Irlando kaj la Aran-insuloj

L'Irlande et les îles d'Aran

Neforgesendaj de la irlanda turismo, la klifoj "Moher" el kalko kaj skisto fascinias pro sia mirinda alteco. Ili ampleksas 8 km longe kaj multnombraj birdospecoj nestas tie.

Incontournables du tourisme en Irlande, les falaises de Moher en calcaire et schiste fascinent par leur hauteur vertigineuse. Elles s'étendent sur 8km et de nombreuses espèces d'oiseaux marins y sont installées.




La famaj irlandaj dometoj kun pajlaj tegmentoj apartenas nun al la pasinteco. Kelkaj postrestas en la plej turismaj zonoj. Ĉi tie en Irishmore, unu el la Aran-insuloj.

Les fameux cottages irlandais à toits de chaume appartiennent désormais au folklore. Quelques-uns subsistent dans les zones les plus touristiques. Ici à Inishmore, une des îles d'Aran.



La stranga ŝtona altebenaĵo nomita "Burren" situas en la grafejo de Clare. Oni rakontas ke dum la konkero de Irlando, oficiro de Cromwell priskribis tiun regionon jene : "Tiu lando ne entenas sufiĉe da akvo por droni homon, ne sufiĉe da arboj por pendumi lin, ne sufiĉe da tero por enterigi lin".

La région des Burren est un étrange plateau rocheux situé dans le comté de Clare. On rapporte que durant la conquête de l'Irlande, un officier de Cromwell décrit la région en ces termes : "C'est un pays où il n'y a pas assez d'eau pour y noyer un homme, pas assez d'arbres pour le pendre, pas assez de terre pour l'enterrer..."



La Aran-insuloj situas fronte al la golfeto de Galivo. Inishmore estas la plej granda kun preskaŭ 1000 loĝantoj. Unu el ĝiaj rimarkindaj lokoj estas la fortikaĵeto Dun Aonghasa : ĝi superstaras la Atlantikon ekde la pinto de klifoj pli ol 100m. altaj. La pli aktiva periodo de ĝia historio estis proksimume 800 jarojn antaŭ JC.. Verŝajnas ke ĝi estis la politika, ekonomia kaj religia centro de la insulo. Oni trovis diversajn spurojn de loĝejoj, osto-pinglojn, manĝejoj, ŝtonajn ilojn kaj konkajn de marfruktoj. Starigitaj ŝtonoj protektas la ĉirkaŭaĵon kontraŭ invadoj.

Les îles d'Aran forment un archipel situé face à la baie de Galway. Inishmore est la plus peuplée avec près de 1000 habitants. L'un de ses sites remarquables est le fort de Dun Aonghasa : il surplombe l'océan Atlantique. depuis le sommet de falaises de plus de 100m de hauteur. La période la plus dynamique de son histoire se situe vers 800 av.JC. Il était vraisemblablement le centre politique, économique et religieux de l'île. On y a retrouvé de nombreuses traces d'habitation, des épingles d'os, auges, outils en pierre, et des tonnes de coquilles de fruits de mer. L'enceinte est protégée par une zone de pierres dressées qui rendent le franchissement difficile.

Kalendaro

Selektitaj renkontoj en Oktobro, Novembro, Decembro

1-3. oktobro

Praktika naturkuraca seminario en Herzberg, Germanio. Temo: "Preventado kaj kuracado de malsanoj per simplaj hejmaj rimedoj". Inf.: Naturkuraca Asocio, S-ro Harald Schicke, Hauptstr. 38, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. Rete: info@ginseng-laden.de

6-8. oktobro

99-a Japana Esperanto-Kongreso en Sapporo, Japanio. Inf.: Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042 Tōkyō-to Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Japanio. Rete: jek12k@jei.or.jp. tel.: +81-3-3203-4581, fakso: +81-50-3737-6438

6-13. oktobro

20-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Cambrils (Tarragona), Hispanio. Esperanta rekontiĝo sen konkreta temo. Inf.: Luis Serrano Perez, Font nova 32, Sabadell (Barcelono) Hispanio.

Rete: luis_serrano@ya.com

11-14. oktobro

MKR (MontKabana Renkontiĝo) en Lovran, Kroatio. Tradicia aranĝo por montnigremuloj gvidas vin cxijare al la Adriatiko, vizitante plej altan pinton de duoninsulo Istrio kaj loĝante tuj apud la maro! Inf.: Vanja Radovanović, Paljetkova 8, HR-10 110 Zagreb, Kroatio.

Rete: vanja.radovanovic(če)ericsson.com

17-21. oktobro

17a Lingva Festivalo en Ĉeboksary (Ŝupaŝkar), Rusio. Lingva Festivalo - estas kultur-edukada projekto, organizata de esperantistoj tra la tuta mondo. Inf.: Junulara Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko. Rete: info@esperanto21.org

19-21. oktobro

KEKSO - Kreativa Esperanto-Kurso en Potsdam, Germanio. KEKSO estas eta Esperanto-aranĝo por junaj germanoj, kiu volas ricevi unuajn spertojn en Esperantio. Tamen kompreneble eksterlandanaj gastoj estas ĉiam bonvenaj. La partopreno por eksterlandanoj estas senkosta. Inf.: Germana Esperanto-Junularo, jarno.riever@esperanto.de

19-21. oktobro

66-a Kultura Semajnfino de SEL en Homburg/Saar en Germanio. Enkonduka kaj progresiga Esperanto-kursoj - prelegoj de Kreshimir Barkovitch, Parizo - libroservo kaj diservo - internacia vesper - prelegoj pri Islando - ekskursoj al Blieskastel kaj Saarbrücken. Inf.: Sarlanda Esperanto-Ligo r.a., Alter Hangarten 2, DE-66440 Blieskastel, Germanio.

Rete: selestraro@esperanto-reto.eu

21-27. oktobro

6-a Kieva Esperanto-Semajno en Kievo, Ukrainio. Konatiĝo kun la glora slava urbo Kiev kaj laŭdezire partopreno en la informa poresperanta kampanjo. Inf.: Volodimir Hordijenko, p/k 35, Kiev-133, UA-01133, Ukrainio, rete: volodimir@ukr.net

25-29. oktobro

Praktikado de la lingvo per Tinĉjo-bildstrio kun Michel Dechy en la kulturcentro Kvinpetalo, Francio. Inf.: Kvinpetalo, Esperanto-Centro, 15 rue du Lavoisier, FR-86410 Bouresse, Francio. info@kvinpetalo.org

27. oktobro - 3. novembro

AÛTUNE 2012 en Greziljono, Baugé, Francio. Komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj - kun kursoj, muzikado, ludoj kaj aliaj aktivaj laŭ via elekto. Inf.: Esperanto-kastelo Greziljono, Château de Grésillon, FR-49150 Saint Martin d'Arce, Francio.

Rete: kastelo@gresillon.org

2-4. novembro

Provludo de Interkant' pri Karmen' en la kulturcentro Kvinpetalo, Francio. Inf.: Kvinpetalo, Esperanto-Centro, 15 rue du Lavoisier, FR-86410 Bouresse, Francio.

Rete: informoj@kvinpetalo.org

2-4. novembro

Klaĉkunveno PostSomera, KKPS en Delft, Nederlando. Okazos renovigita versio de la PostSomera Klaĉkunveno. Internacia organiza teamo bonvenigos vin en Delft (NL). Estos prelegoj, ludoj, ekskursoj, muziko, kaj ĉefe...klaĉoj! Inf.: Nederlanda Esperanto-Junularo. Oosterstraat 65, NL-2611TV Delft, Nederlando.

Rete: kkps2012@googlegroups.com

3-5. novembro

18-a Kolombia Kongreso de Esperanto - La kongreso en urbo Kalio estos superba! Se vi bezitas veni al Kolombio, memoru ke la plej granda risko estas ke vi poste ne deziros reiri al via lando... - Inf.: Ruben Torres, Carrera 85 No. 16-68, Cali, Colombia.

Rete: info@esperantoColombia.org

8-11. novembro

1-a Internacia Esperanta Lernejo en kastelo Bartošovice, Ĉeĥio. Studado de Esperanto por komencantoj kaj progresintoj, koncerto de Anjo Amika en la kastelo, Fiŝkapti Festivalo. Inf.: radio Verda Stacio verdastacio@gmail.com

7-9. decembro

13-aj Bjalistokaj Zamenhof-tagoj en Bjalistok, Pollando. Prelegoj, konkursoj, koncertoj, teatraĵoj, ekskursoj tra la urbo kaj laŭ "la reĝa vojo" en la regiono podlaĥia, tradiciaj noktaj renkontiĝoj de geamikoj en la esperanto-klubejo. Inf.: Bjalistoka Esperanto Societo, PL-15-282 Bjalistok, str. Piękna 3, Pollando.

Rete: esperanto.bialystok@interia.pl

13-16. decembro

17-a Nacia Esperanta Renkontiĝo La Metiejo en Guantamo, Kubo. Nacia renkontiĝo kaj metiejo kun interesa programo, kultura, scienca ktp. Inf.: Esperanto klubo de Guantamo, Mart#701 esquina Narciso Lpez, Guantamo, Cuba. Rete: robertesp@unimed.gtm.sld.cu aŭ robertesperanto@yahoo.es

27. decembro - 3. januaro

29-a Internacia Festivalo en Dortmund, Germanio, en moderna domo urbocentre sed en trankvila ĉirkaŭo. Kadra temo: Komputilo kaj interreto. Tuttaga ekskurso tra la Ruhr-regiono, kun vizitoj al urboj Bochum, Essen kaj Oberhausen. Pllongiga eblo ĝis 4-a de januaro. Inf: Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio. Tel./fakso +49-5624-8007, porteblo +49-171-4964558

Rete: HDP(če)internacia-festivalo.de

27. decembro - 3. januaro

11-a Novjara Renkontiĝo (NR) en Xanten (okcidente de Essen/Ruhr), Germanio. Por infanoj, familioj kaj aliaj plenkreskuloj. Ĉ. 150 partoprenantoj el deko da landoj. Prelegoj, koncerto, teatraĵo, ekskursoj. Lingvokursoj por komencantoj, konversacio - kaj bela internacia etoso. Inf.: EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wiciefstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio.

Rete: lu.esperantoland@gmx.de

28. decembro - 2. januaro

SANO 3 La alternativa jarŝanĝa seminario en Herzberg/Sieber, Germanio. Inf.: Germana Esperanto-Centro/ Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg/Harz - la Esperanto-urbo, Grubenhagenstr. 6, Germanio. Tel: +49-(0w)5521-5983. esperanto-zentrum@web.de

Fonte: <http://www.eventoj.hu>

Les cours d'Espéranto reprennent à Angers !

Bienvenue à chacun pour découvrir, apprendre, pratiquer, jouer

et bien plus.....



Nous contacter

Centre Culturel Angevin d'Espéranto

41 rue Pierre Melgrani 49000 Angers
 Tél. 02 41 73 17 97
 Courriel : info@esperanto-angers.fr

Vous informer

www.esperanto-angers

www.esperanto-france.org
 www.esperanto-jeunes.org
 www.uea.org
 www.esperanto.net